# AMERIKA ESPERANTISTO



JULY, 1913

# The New Testament IN ESPERANTO

Translated from the original Greek by a special committee whose care and competence assure a thoroughly accurate and correct rendering.

White Paper Edition:

No. 1. Art Cloth Gilt, 45 cents.

No. 2. Limp French Morocco, 60 cents.

No. 3. Leather-lined Persian Yapp, \$1.50.

India Paper Edition:

No. 4. Limp French Morocco, 90 cents.

No. 5. Leather-lined Persian Yapp, \$1.75.

EVERY ESPERANTIST WANTS A COPY.

EVERY MINISTER SHOULD BE SUPPLIED WITH A COPY.

EVERY PUBLIC LIBRARY NEEDS AT LEAST ONE COPY.

The present edition is limited, and there may be much delay before another appears. Therefore send your order at once.

## THE AMERICAN ESPERANTIST CO.

WEST NEWTON, MASS.

## NEW EDITION !!!

#### THE WHOLE OF ESPERANTO Just off the Press

EXCELLENT NEW SUMMER PROPAGANDA MATERIAL

ORDER TODAY

5c per copy 10 for 25c

50 for \$1.00

Contains Grammar, Vocabularies and a Little Story. Just the thing to interest your non-Esperantist friends.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.,

West Newton, Mass.

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

#### THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

West Newton, Mass.

ONE DOLLAR A YEAR

Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50)

SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukaĵoj kaj novaĵoj estas ĉiam prefere akceptitaj. Oni ne resendas neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

Vol. 13

JULY, 1913

No. 6

#### EL LA REDAKCIA SANKTEJO

Komencante nian redakcian laboron, ni opinias ke estas bone ke ni klarigu al niaj legantoj kaj verkistoj nian pozicion rilate esperantan stilon.

Bonvole atentiĝu al la letero de Prof. Edmond Privat sur alia paĝo en ĉi tiu numero en kiu li esprimas siajn sentojn pri ĉi tiu sama afero. Neniu pli ol ni ŝatas la Majstran stilon, kaj tiun de la fruaj verkistoj kiuj faris tre grandan kaj imitindan antaŭpuŝon al nia amata afero. Multaj el ĉi tiuj jam transpasis la bordon de la mondo nekonata, kaj al ili apartenas la respekto kaj la honoro de ĉiu bona Esperantismulo. Pacon al ili!

Neniu pli ol ni kontraŭbatalos la enkondukon en nian lingvon de

sensencaj kaj nebezonitaj ŝanĝoj.

SED—Esperanto vivas kaj progresas! Estas necese ke ĝi, same kiel ĉiu alia monda afero, aŭ ĉiam progresu aŭ mortu! Venas ĉiutage en la mondon novaj aferoj, novaj interesaĵoj, postulantaj novajn esprimojn, kaj novajn verkistojn kiuj devas bone kompreni tiajn aferojn. El tiuj, ĉiu devas havi sian propran esprimstilon, por ke li povu klare kaj facile esprimi siajn ideojn laŭ sia propra pensmaniero. Neniam du cerboj tute same funkcias, kaj ke unu penas sekvi blinde en la vojo de alia nepre iom difektos al li la verkon kaj malhelpos la progreson de la

lingvo. Estas nepre necese ke ĉiu ne traduku laŭvorte, la idiotismojn de sia propra lingvo, kaj ke li ne ofendu kontraŭ la simplaj gramatikaj reguloj, sed preter tiu ne senpense sekvu en la piedsignoj de aliaj verkistoj. Uzu la gramatikojn kaj la vortarojn! Rigardu la esprimstilon de bonaj verkistoj! Sed—ankaŭ uzu vian propran cerbon! Se esprimoj uzitaj de aliaj ne ŝajnas al vi bonaj, ne uzu ilin. Se vi havas bonan esprimon kiu estos komprenebla al ĉiu, uzu ĝin, eĉ kvankam neniu ankoraŭ uzis ĝin. Se ĝi estas bona, aliaj uzos ĝin, kaj la lingvo gajnos novan kaj pluan riĉecon. Se ĝi ne estas bona neniu uzos ĝin—kaj ĝi pereos ne farinte ian malhelpon.

Ni dankas al la samideanoj pro iliaj aprobo kaj bonvoloj kiel tiuj montriĝas per la fako "Kicks and Komments". Ni ankaŭ dankas ilin pro la kritikaĵoj ricevitaj—ĉi tiuj kaŭzis al ni maldolĉegajn larmojn, sed ni esperas ke ni profitos per ili. Pri la malaproboj kiujn ni ne kura-ĝas presi, ni certigas al vi ke ĉi tiuj helpos nin treege.

Ni sciiĝas ke la E. A. N. A. havas sian jarkunvenon dum julio. Kompreneble ĉi tiu estos notinda kunveno ĉar ĝi estos (ni esperas) tute kvieta kaj pacema—kaj tiel tre malsimila prezentado ol la kutima kunveno ĝojata de plej multe da organizadoj kiuj kunvenas ĉiujare.

La redakcio de Amerika Esperantisto gratulas Pastron Mojado pri tio kio ĵus okazis ĉe la "Christian Brothers College," kiel oni povas vidi en la Kroniko Nordamerika. Por la sukceso kiu estas atingita, oni devas danki kaj gratuli Pastron Mojado kaj liajn fervorajn helpantojn kiuj dum monatoj kaj jaroj laboris por la celo.

## LETERO EL EUROPO

E nun mi havos per "Amerika Esperantisto" ĉiumonatan okazon komuniki kun miaj usonaj samideanoj, al kies agado mi jam de longe speciale interesiĝas kaj simpatias. Antaŭ ses jaroj mi kunlaboris inter la pioniroj de ilia movado per naŭmonata propaganda vojaĝado tra Usono. Je tiu tempo nur malmultaj tie troviĝis, kiuj povis flue paroli nian lingvon. Instruado tiam min okupis tiom urĝe, kiom propagando.

Antaŭ kelkaj semajnoj duan viziton mi faris al Usono, bedaŭrinde sed devige nur tre mallongan. Ĝoje mi konstatis, ke nun ekzistas en Usono multaj bonegaj Esperantistoj, kiuj tute flue kaj facile parolas la lingvon. Grandan plezuron mi ricevis el tiu konstato, kaj koran gratulon mi sendas pri tiu grava progreso plenumita dum la lastaj jaroj.

Ankaŭ preskaŭ tute malaperis la pli frue en Usono tre komunaj eraroj kaj duboj pri elparolado de la vokaloj. La Sesa Kongreso en Washington kaj la ĉiujara spertado de kelkaj partoprenintoj ĉe kongresoj en Eŭropo disvastigis pli bonan elparoladon kaj kutimigis eldiri "jes" tute nature "yes" anstataŭ "yace" kaj eldiri "kies" tute simple "kee-ess" anstataŭ "kee-yace." Tiel mem korektiĝis per praktika uzado la malbona efiko de eraroj aŭ nesufiĉaj lernolibraj klarigoj.

Tiun fakton mi citas, ĉar ĝi estas plej bona argumento kontraŭ la ŝajne-lerta aserto de kleraj skeptikuloj, ke "Esperanto baldaŭ disfalos en dialektoj." Male nia dudeksesjara historio montras ke unueco ĉiam kreskis kun internacia uzado. De kongreso al kongreso oni povis konstati, kiel pli unuforme kaj samakcente parolas la delegitoj. Ju pli da uzo, des pli da unueco. Kio estas vera por la elparolado, tio estas simile vera por la stilo. Facile estas konstati, ke iom post iom kreiĝis granda unueco da stilo en nia literaturo. Kvankam estas ja vasta libereco kaj plena ebleco, ke ĉiu aŭtoro montru sian propran personan skribmanieron, tamen estas observinde, ke ekzistas ĝenerala kutima esperanta stilo, kiun oni akiras per legado de nia gazeta kaj libra literaturo. Kiu ankoraŭ ne akiris tiun "spiriton de la lingvo" laŭ la esprimo de Dro. Zamenhof mem, tiu skribas en maniero al ni pezŝajna kaj neagrabla.

Tiun unuecon kreis la uzado kaj tute ne iaj decidoj de reganta komitato. La ekzemplo pri la elparolado de vokaloj estas bonega rebato ankaŭ al tiuj personoj, kiuj opinias, ke Esperanto devus esti nur vortsistemo reguligata de oficialaj dokumentoj, ĉar ili timas, ke la naturo kreas erarojn dum ili fidas aŭtoritatajn decidojn kaj paperojn por konservi ordon en la lingvo. Nu ĝuste pri la vokaloj, la aŭtoritataj paperoj (la lernolibroj) eraris, kaj la naturo (la uzado) korektis iom post iom la eraron.

Ni ĝoju, ke nia lingvo Esperanto estas vivanta kaj ĉiutage fariĝas per uzado pli kaj pli natura. Ni ĝoju ankaŭ, ĉar tiu vivo per praktika uzado donas al ĝi samtempe admirindan unuecon. Pri tiuj ĉi temoj kaj pri aliaj oni petis ke mi resumu per klaraj mallongaj artikoloj la ĉefajn ideojn, kiujn mi celis esprimi dum la lastaj kvin jaroj en miaj diversaj paroladoj kaj verkoj: "Vivo de la Lingvo," "Pri Esperanta Literaturo," "Historio de Esperanto." Mi klopodos tion fari en sekvantaj numeroj kaj kun granda plezuro mi laŭeble respondos al ĝeneralaj demandoj, kiujn oni sendos al mi per la redaktoro, kiu konstante konas miajn diversajn adresojn.

EDMOND PRIVAT.

Instruistino en dimanĉa lernantaro: Kiu grava afero okazis je Paska dimanĉo?

Knabeto: Tiu estis la tago kiam panjo irigis paĉjon al la preĝejo.

#### KICKS AND KOMMENTS

"There were thirty long pages from Howler, with underlined capitals topped,
And a short disquisition from Growler, requesting his newspaper stopped."

Will Carleton.

"I like the new paper, etc., better than the rough kind. Only objection I see to new form is that it does not admit parallel English and Esperanto, which all who are not independent like, as one of the best features I think."

"The first number out of West Newton has lassoed the attention, pulled the interest and awakened the solar plexus of the whole blooming movement in the benighted states, believe me."

"The new form of the magazine is very attractive, and the last num-

ber, for a first issue, was excellent."

"I like all changes you have made in A. E. Certainly by the new format alone it does not take a clairvoyant to see that Baker's child is going to have some of the moth balls shook out of him."

"I am as proud of Am. Esp. as I hope you are. It's bully. You

will make a howling success on this job."

"I am very much pleased with the new magazine and you may count on my continued subscription as long as it exists."

". . . discontinue the paper. I will not pay for any issues that

you may send me of Amerika Esperantisto."

"I hope you are going to tell us that the young Swiss (Prof. Privat) is going to edit the magazine." (Editor's note: !!-!?!!!)

"I make no 'kicks.' My 'komment' is that it gives me all that I can

make use of in a month and you have my best wishes."

"The June number of Amerika Esperantisto is certainly an improvement over the May issue in its appearance. Keep up the good work."

"I am very well pleased with Amerika's new dress."

"Allow me to say that I wish you success in your new venture. The first issue was fine."

"'Kicks and Komments' is good stuff, too. I fancy that sort of thing, especially when some jinx hands across some damphool slams like—never mind. Why couldn't some Komments be in the language? Have you no readers left in Yurrup?"

"Unue, mi deziras diri al vi, ke la junia numero de A. E. estas estas efektive—laŭ mia humila—tre valorinda—opinio, la plej bona numero de tiu ŝatinda ĵurnalo aperinte!"

"I wish to ———— tho you could see your way to making it more plump. It is getting the necessary red-corpuscular development, but lacks carbo-hydrates."

#### ASK US!

#### We might possibly know

Please explain the following words for me: Volbo, susuri, ŝvebi.
 Volbo—Architectural term; a circular ceiling constructed by means
 of specially arranged stones in such a way that they become fixed by their
 own weight.

Susuri-to rustle (as silk, banknotes, etc.).

Svebi-to hover, as a bird, in the air, without moving its wings.

- 2. Please distinguish between the Esperanto c-s-z. In Esperanto could one tell "certe", "serte" and "zerte" apart, if there were such words?
- (S)(z)(c)ertainly. If there was such a word as "cpganrsuqpdbsatkvg" we couldn't pronounce it to save our life—but there isn't, so why worry about it?
- 3. Why does devus mean "ought to"? Wouldn't it mean "might have to"?

Because it has seemed to the majority of Esperantists to convey that meaning, and the newer Esperantists accept the opinion of experts. There is no law about it, but the preferable way of rendering "might have to" is "estus devigita."

4. What is the word for "mustn't"? "Ne devas" might mean "does not have to"?

"Ne devas" is used for "mustn't" following the French usage. If one prefers he can put the "ne" before the infinitive as "Li devas ne perdi", tho this is an unnecessary precaution.

5. Couldn't "la pomoj estis acetitaj de li" be translated "The apples had been bought from him" or "by him"?

Yes, "acetitaj de li" can have two meanings. To avoid ambiguity, use the active voice.

6. Does "post" really mean "behind" or "after"? Does "post tago" mean "in a day"?

"Post" means both "behind" and "after," the latter meaning being easily derived from the former; "post tago" means "after a day", which is also expressed by "in a day" or "a day later".

#### TRO MALFRUE

Ho ve knabeto, ĉu vi fumas cigarojn?

Vi ne povas havi ĝin, sinjorino, se vi ja sugestias. Mi estas promesinta la restaĵon.—Lampoon.

#### EL LA MALNOVA MONDO

De nia Privat-a korespondanto

Dum la lasta monato okazis multaj naciaj esperanto-kongresoj en Eŭropo kie tiaj manifestacioj ĉiujare plimultiĝas kaj helpas al publika reklamado en la gazetaro kaj al oficiala subteno de urbaj aŭ komunaj aŭtoritatoj.

En Eastbourne (Anglujo) kunvenis ĉirkaŭe 400 britaj samideanoj kaj 30 delegitoj de diversaj landoj por la Nacia Brita Esperanto-Kongreso. Rimarkindaj estis la oficiala patroneco de la Duko de Connaught, frato de Reĝo Edward VII, kaj la belega akcepto de la urbestro. Dum la kongreso okazis jarkunveno de la B. E. A. ĉe kiu S-ro H. B. Mudie estis re-elektita prezidanto, ankaŭ speciala kunveno de teozofoj kun parolado de S-ro Mann kaj tre ĝojiga amika manifestacio inter franca kaj germana delegitoj, laŭ kies propono gratula telegramo estis sendita al la propaca kunsido de germanaj kaj francaj parlamentanoj en Bern (Svisujo). Multaj aperis gazetartikoloj pri la sukcesplena Eastbourne kongreso kaj pri tiu ĵus aludita telegramo.

La dua kongreso de aŭstriaj esperantistoj okazis en Graz (11-12 Majo). Tie fremdaj delegitoj ne estis bezonataj por necesigi uzon de la lingvo esperanto dum ĉiuj kunvenoj. Oni ja scias, ke Aŭstrio entenas pli ol dekkvin diversajn naciojn kaj lingvojn. Vienanoj parolas germane, bohemoj ĉeĥe, istrianoj itale, galicianoj pole aŭ rutene, bosnianoj serbe aŭ turke, k. t. p. Interesaj diskutoj kaj ekzamenoj okazis, ankaŭ kunveno de katolikaj esperantistoj.

La esperantistoj de orienta Francujo: Jura kaj Burgonjo havis Federacian Kongreson samdate sub prezido de universitata Rektoro Boirac. Multaj oficialuloj, deputatoj kaj militoficiroj ĉeestis. Estis elektita prezidanto de la Federacio S-ro Bord, vic-urbestro de Beaune. Kunvenis speciale la U. E. A. delegitoj de la distrikto sub prezido de S-ro Rousseau.

En Valence kunvenis la Sud- orientaj francaj esperantistoj de la Rodana Federacio. Paroladis la urbestro, S-ro Rollet de l'Isle kaj S-ro Poncet, kiu gajnis vojaĝstipendion ĉe esperanta ekzameno kaj rakontis kun lumbildoj sian vojaĝon al Polujo. U. E. A. delegitoj kunvenis por aŭdi raporton de distrikta Del. Sogubert.

La 5a Belga Kongreso en Spa, ankaŭ samdate, estis oficiale akceptata de la urbestro kaj ĝuis specialan prezentadon en Esperanto ĉe la teatro.

Niaj Danaj samideanoj, ĉiam ĉe la sama dato, renkontiĝis en urbo Aarhus, kies gvidlibro ĵus aperis Esperanto. Kunvenis ankaŭ la U. E. A. delegitoj de la distrikto. Favorajn artikolojn enpresis la ĉiutagaj gazetoj.

En Germanujo speciala esperantista asocio de laboristoj nun entenas 70 lokajn grupojn kaj entute 1154 membrojn. En Leipzig la urbestraro organizis specialan kurson por siaj oficialaj komizoj kaj policanoj. 40 el tiuj estis ĵus ekzamenitaj kaj ricevis municipan helpon por fondi klubon.

En Shanghai (China) esperanton oni nun devige instruas ĉe normala, virina kaj komerca lernejoj. Aliaj kursoj organiziĝas en Ĥinujo. Kelkaj centoj da novaj membroj tie aliĝis al U. E. A. kaj multaj artikoloj pri la lingvo kaj pri U. E. A. presiĝis en ĥinaj gazetoj. Tiu progreso de nia movado en Ĥinujo estas plej bona argumento kontraŭ tiuj personoj, kiuj asertas ke angla lingvo estas tute universala en Azio k. t. p. Pro la tra-siberia fervojo kaj la ĉiam pli granda trafiko kun Rusujo, la ĥinoj nun rilatas norde kaj okcidente kun homoj, ĉe kiu esperanto estas multe pli universala kaj utila ol la angla lingvo. Estas rimarkinde ke la angla lingvo disvastiĝis eksterlande ĉefe per mara trafiko. Sed nun la tra-kontinentaj grandaj fervojoj ekprenas, pli gravan lokon ol la maraj vojoj kaj sur la kontinenta tero fariĝas pli kaj pli universala esperanto kaj ne angla lingvo.

### NAŬA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bern, 24-31 Aŭgusto 1913

La tempo rapidas! Nur tri monatojn ankoraŭ kaj nia granda festo komenciĝos.

En nia lasta kunsido ni starigis la programon de la kongreso. Laŭ tiu programo la solena malferma kunsido de la Naŭa okazos la 24-an de Aŭgusto (dimanĉo) je la tria posttagmeze; la solena malferma kunsido de U. E. A. lundon 25-an de Aŭgusto posttagmeze. Ĉiutage, escepte merkrede, okazos la laboraj kunsidoj de la Naŭa kaj de U. E. A. La solena ferma kunsido de la Naŭa okazos sabaton posttagmeze. Ĉiumatene inter la 8-a kaj la 10-a, kaj ĉiuvespere post la 5-a kunvenados la diversaj fakaj societoj. La komitatoj de ĉi tiuj societoj bonvolu senprokraste komuniki al ni kiom da kunsidoj ili deziras, por ke ni povu starigi horaron.

La 24-an de Aŭgusto estos diservoj en protestanta, katolika kaj hebrea preĝejoj. Merkrede estos aranĝata belega tuttaga ekskurso al Berna Alparo. La kongresanoj troviĝos meze de la neĝa montaro kaj ĝuados nekompareblan pejzaĝon. La internacia balo, en mirinde bela salonego de la Nova Kazino okazos ĵaŭdon vespere. Ne forgesu alporti viajn naciajn kostumojn!

Kiel teatraĵon oni ludos la originalan svisan dramon "La Patreco,"

verkitan de samideanino M. Wolf en Chaux-de-Fonds.

Plej bela festo de la tuta kongreso kunvenigos la Esperantistaron la 31-an de Aŭgusto sur Gurten, monto 860 metrojn alta proksime de Bern, kun elektra fervojo: Matene prezentado de la Ruĝa Kruco, poste festeno en ombra parko. Posttagmeze granda svispopulara festo kun "jodlada" koncerto, luktado k. t. p.

Ĉiuvespere dum la kongresa semajno estos belaj koncertoj, paroladoj kun lumbildoj, promenadoj ĉirkaŭ la urbo, boatveturoj sur Aare k. t. p.

La Kongresa Libro estos tre riĉenhava kaj servos kiel taŭga kaj fidinda gvidlibro. En ĝi oni trovos la liston de ĉiuj kongresanoj, kiuj pagis sian kotizon antaŭ la fino de junio. La kongresa karto kostas 6 Spesmilojn (15 frankojn), la help-kongresa karto 3 Sm. La oficialaj poŝtkartoj estas tre volonte aĉetataj (10 centimoj po peco) kaj la unua provizo da sigelmarkoj baldaŭ estos elĉerpita (100 pecoj=0,40 Sm.).

Ni ankaŭ memorigas pri nia lasta cirkulero, per kiu ni publikigis

la novajn, pli malaltajn prezojn por la loĝado.

Berno, en Majo 1913.

La Direktanta Komitato.

#### ESPERANTO-LINGVO INTERNACIA

Sonnet by "Melodio"

A Mighty Voice is sounding far and near,
The herald-cry of Universal Good,
The prophet-song of Peace and Brotherhood
In thrilling accents, resonant and clear—
Attend, ye Peoples! All ye Lands, give ear!
Throughout the Earth, as loyally it should,
Be Zamenhof's high purpose understood
And consummated. Thus shall perish Fear.

O Wondrous Vinculum of Common Speech,
To bind the waiting Nations, each to each,
In love, and trust, and kindred sympathy—
We give thee hail! God speed thine onward way!
Let Babel cease! Let Harmony hold sway!
Approaches now the Year of Jubilee.

Kiam oni vidis Absolomon pendantan per la hararo, oni ekkriis, "Kian reklamilon por harfortigilo."

#### **WORLD-GLEANINGS**

SPAIN. King Alfonso, long an advocate of Esperanto, has sanctioned the establishment of Esperanto classes in the University of Madrid. Higher Commercial Academy, Institute of St. Isidore, and in teachers training colleges.

GERMANY. Twenty teachers are taking a special course of instruction in Augsburg. The "Union of Esperanto Teachers" is an officially recognized teachers' organization with a membership of over 100.

FRANCE. At the large emporium of "Printemps" may now be found Esperanto interpreters. It is a well-known fact that the international language is already spoken at the Bon Marche and the Louvre.

RUSSIA. The Minister of Internal Affairs has given permission to the Russian Esperantists to arrange their 2nd Tutruslanda Esperanta Kongreso in Kiev. During the 26 years of Esperanto existence, Russia has had only one Congress.

The director of a weekly sport journal, published in Kiev, has decided to have all chronicle outside of Russia entirely in Esperanto.

SCOTLAND. Among the Esperanto classes in Edinburg there is one specially conducted during the day for members of the staff of the prominent daily paper "The Scotsman."

AUSTRALIA. The Minister of Education in Fremantle is learning Esperanto. About to start for Europe on a long tour, he wishes to see for himself whether the language is as useful as its advocates claim it to be.

#### ESPERANTO J. H. FAZEL

When slang makes English meaningless,
And hard to understand;
When dialect and gab distress
As in a foreign land,
I turn with joy and comfort sure
From such linguistic stuff
To ESPERANTO, sweet and pure,
And find it good enough.
You study Russian, French and Dutch,

But not because you want to;
Their study fails to teach you much,
So, give me Esperanto.

For it is simple, rich and strong,
And easy quite to learn.
No silent letters string along.
To spell gives no concern.

So Esperanto is my choice, For it is up to date,

It has a universal voice, That calls to better fate.

It saves a lot of trouble, too, In learning other chatter.

So learn it quick; its up to you, And that is what's the matter.

#### KRONIKO NORDAMERIKA

DETROIT, MICH. La Detroit German-Usonana Esperantista Societo prezentis, junio la 8an, ĉe la Halo Turnverein, du ĉarmajn komedietojn. Ĉi tiu okazaĵo estis la unua publika propaganda afero de la societo. D-ro Tobias Sigel, esperanta konsulo en Detroit, malfermis la festenon per mallonga parolado, en kiu li klarigis la fundamentajn punktojn de la gramatiko esperanta. Tiam sekvis la komedieto "La Verda Standardo." La dua parto de la festeno konsistis el la tre amuza "La Renkonto." Ĝi montris la malfacilaĵojn de diversaj naciemuloj—polo, anglino, italo, francino kaj germano—kiuj renkontis en hotelo kaj ne povis interkompreni unu la alian ĝis kiam eniris esperantisto. Tuj kiam ili aŭdis "la karan lingvon" ili ĉiuj ekdiris ĝoje kaj tiam trovis ke ĉiu estas esperantisto. Laŭtaj aplaŭdoj salutis ĉi tiun komedieton. Tre grava indiko de la publika estimo al ĉi tiu societo estas la multaj mon-pagitaj reklamoj en la programo.

PLAINVIEW, NEBRASKA. La "Plainview Republican" tre grava tagĵurnalo enhavas bonan artikolon pri la temo "Anglo kiel internacia lingvo." La verkisto, S-ro. P. H. Peterson, fervora esperantisto, montras la ridindecon de la "simpligita anglo" kaj la neceson por la internacia lingvo, Esperanto. Ĉe la "Naŭa Distrikta Kristancelada Kunveno" (Clay Center), junio la 10an, S-ro Ray Hulburt parolis pri "monda lingvo kaj monda frateco." La loka tagĵurnalo bone raportis la paroladon.

TACOMA, WASH. La 5an de junio la Tacoma Esperantista Klubo finis siajn kursojn per festeno ĉe la Komerca Klubo, Ĉiuj babilis en Esperanto kaj la kelneroj kun scivolaj okuloj rigardegis la eksterlandulojn kaj atente aŭskultis al la stranga lingvo. Post la manĝo sekvis bona programo en kiu la plimulto partoprenis. Juĝisto J. M. Arntson estis la toastestro. La Prezidanto, C. E. Donelson, faris la unuan paroladon. Dum li parolis li tenis sin tiel serioze ke la kompatindaj kelneroj ŝajnis pensi ke li faras funebran paroladon kaj ili estis videble kortuŝitaj—de tempo al tempo deturnis la vizaĝon kaj forviŝis larmojn. Tamen la parolado ne estis funebra sed la rekta malo—ĝi estis humora. Aliaj paroladoj estis faritaj de S-roj Fred Rivers, J. W. Wood, kaj Farnsworth Wright. S-ro Mort Howe faris belan toaston.

La "Tacoma Daily News" tagĵurnalo presis poŝtkarton kiun la loka komerca klubo ricevis de D-ro Zamenhof. La eminenta majstro gratulis la organizadon pro la eldono de la bela Tacoma gvidlibro.

ST. LOUIS, MO. Tre gravan kaj interesan sciigon ni ĵus ricevis el ĉi tiu urbo. La "Christian Brothers College"—eble unu el la plej grandaj privataj universitatoj en Usono, nun havas la subjekton "Esperanto" en sia regula kurso. La plena katalogo, kiun ili eldonas, havante 109 paĝojn, enhavas tri paĝojn pri la Esperanto-kurso kun la jena klarigo, esperante presita: "Oftaj demandoj pri Esperanto devigis la estraron malfermi regulajn kursojn pri tiu ĉi Internacia Lingvo. Oni malfermos la du sekvantajn kursojn al ĉiuj studentoj de la alta lernejo kaj de la kolegiaj fakoj."

Oni havas du kursojn: unu por komencantoj, uzante la "American Esperanto Book," la alia por progresintoj kiuj studas la "Kellerman Complete Grammar." Por ĉi tiu grava antaŭenpuŝado al nia movado, oni devas danki Pastron Mariano Mojado, kiu, dum kelkaj jaroj, ĉiam fervore kaj senlace laboras por nia kara afero.

PITTSBURGH, PA. Sub la aktiva direktado de S-ino W. S. Stoner kaj S-ro J. M. Clifford, la afero daŭriĝas kreski kaj reklamiĝi. La Esperanta Fako de la Akademio de Scienco kaj Arto ankoraŭ bone kaj fervore laboras. La estroj nun eldonas leteron al la samideanoj kiuj ĝis nun ne aliĝis al la Akademio, petante ilian subtenadon.

Ĉe pikniko kie oni ĝuis tre feliĉan tagon, S-ro Clifford, unue, legis lecionon el la Nova Testamento; S-ino Stoner mallonge paroladis; Fraŭlineto Stoner donis originalan deklamadon kaj F-ino M. L. Root parolis pri Bahaismo—la movado kaj ĝiaj celoj. Post la paroladoj, k. t. p., la festo estis servata. La kunveno finiĝis per adiaŭa ovacio al F-ino M. K. Anacker, kiu intencas partopreni ĉe la IX-a Kongreso. La loka tag-ĵurnalo, "Pittsburgh Dispatch" donis multe da spaco al la pikniko.

BOSTON, MASS. Junio la 28an okazis la ĉiujara somera kunveno de la Nov-Angluja Esperantista Asocio, kaj laŭ kutimo, ĉiu kiu partoprenis ĝuis "la tempon de sia vivo." La afero, sub la direktado de F-ino Meriam (ano de la Bostona Societo) konsistis el vojaĝo al "Marblehead," tre bela historiplena urbeto apud la maro, kaj vespermanĝo ĉe hotelo tie. Per speciala aranĝado kun la estroj de la elementoj, S-ro E. S. Payson, Prezidanto de la Asocio, provizis belan, idealan junio-tagon, kaj—stranga afero ĉe pikniko—ne pluvis dum la tuta tempo (Dank' al S-ro Payson). Samideanoj el Portland, Manchester, Boston kaj ĉirkaŭaĵoj, kaj aliaj lokoj en Massachusetts, kunvenis ĉe la stacidomo je 1.30, por forveturi per la speciala elektra vagono. Post eble du horoj, veninte al la citita loko, oni promenadis tra la urbeto kaj suprenrampis la ŝtonegojn kiuj kuŝas apude, al la bela maro. La festo okazis je la 7a horo. Ĉiu babilis, ridetis, ridegis, k. t. p.,—dirante nenion gravan, kaj aŭskultante la saman.

La tago finiĝis—lacaj, sed feliĉaj, ĉiuj (escepte tri malfruemulojn) revenis Bostonon per la speciala tramo, ĝoje ekkriante, "Ĝis la Revido."

NEWTON, MASS. Dimanĉon, junio la 29an, ĉe Diservo en la "Grace" Episkopa Preĝejo, S-ro Wm. G. Hambleton, orgen-ludisto, ludis la internacian himnon "La Espero," kiel la postludon de la servado.

HALIFAX, N. S. La "Morning Chronicle", ankaŭ la "Herald," tre gravaj ĵurnaloj, presis longajn artikolojn tradukitajn en Esperanton de S-ro J. M. Geldert, konsilanto de la E. A. N. A.

#### AN EXAMPLE OF WESTERN ENTERPRISE

It will be remembered that some twelve months ago the Chamber of Commerce of Los Angeles, California, published 10,000 64-page advertising booklets, entirely in ESPERANTO, for foreign advertising. The lecture-tour of Mr. D. E. Parrish, who was sent through twenty-five different countries, to speak in ESPERANTO and to advertise California, aroused such a deluge of inquiries about the State that it was necessary to get out this special edition. Up to date, the Secretary informs us, about 3,000 of the books have been sent out, the inquiries having come from not less than 46 different countries.

This simple method of foreign advertising should be made known to every Commercial Chamber in the United States. A better example of the practical use of Esperanto in the Commercial world cannot be found. We would advise every Esperantist to secure a copy of this interesting and beautiful publication, and to see that the local Commercial Chamber or similar organization is supplied with the same. Free on prepayment of postage, 2c per copy. Address: Chamber of Commerce, Los Angeles, California.

Memoru, Arturo, ke vi estas filo de sinjoro, kaj penu konduti simile al tio, nur unu tagon.

Bone, panjo, sed tio difektos la tutan tagon por mi.

Panjo: Mi donis oranĝon al ĉiu el vi knaboj. Karlo, vi promesis ke vi ne manĝos la vian ĝis post tagmanĝo. Jako, vi same promesis. Ĉu vi estas trompintaj min?

Ne, panjo. Ni ne manĝis la niajn. Mi manĝis la lian kaj li manĝis la mian.

#### OFFICIAL COMMUNICATIONS

Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj volonte presigos komunikaĵojn de ĉiu esperantista societo, kiu havas internia legantaro sufiĉe da anoj aŭ kies speciala fako de laboro interesos niajn abonantojn.

### The Esperanto Association of North America Central Office: Newton Center, Mass.

#### ESPERANTISM AND PATRIOTISM

A careful analysis of the distribution of the membership of E. A. N. A. and of the Esperanto movement in general throughout North America reveals the fact that in some sections there is a tendency to run after strange gods so far as Esperanto Organizations are concerned; that in such sections neither is the Association strong, nor is the Esperanto movement strong. On the other hand, where the National Association is strongest and best organized, there also may be found the greatest strength and membership of several foreign organizations which are ably fitted to supplement but not to lead the propaganda of Esperanto in our country.

The most patriotic citizen is the man who is first of all loyal to his family and he can best serve in Organizations of State who is an active unit in the lesser and more intimate family circle.

The Esperanto Association of North America is our family and to it we owe our first duty. The more intimate our connection with it, the better and more useful members we can be of similar organizations whose final purpose is the same as our own. However strongly we may be in sympathy with some special features of kindred organizations, national pride should lead us to place our National Organization first.

Among the successful workers for E. A. N. A. are to be found many who are giving freely their time and strength to the movement. All of this work is done at a personal sacrifice and to these is due the moral support of every person who is interested in Esperanto, or for whom Esperanto has done anything.

Whatever the ultimate personal interest of the thousands of Esperantists who will read these lines, that interest will best be served by the individual moral support of every person who really desires the ultimate triumph of Esperanto.

Second in importance is the financial support of the Association. The membership fee was fixed at a nominal sum in order that it would be within the means of every man, woman and child who is interested in the welfare of Esperanto. At the last annual meeting the question of increased dues was left to the Executive Committee. The matter has been seriously considered and it is the opinion of the Committee that the dues should remain as they are, but that a special membership which is already provided for by the constitution should be more seriously brought to the attention of those who feel inclined to aid more liberally in our support.

This special membership provides for an annual payment of two dollars, in addition to the regular dues of fifty cents, and entitles the person so paying to be listed as a Special Member. The regular dues will provide for the running expenses and the enrollment of five hundred, or a thousand, special members will provide a tidy sum for real and efficient propaganda work.

By special arrangement with the American Esperantist Co. we are enabled to make a combination offer of subscription to Amerika Esperantisto for one year and Special Membership card at a cost of \$3.00, making the subscription price of the magazine to such members only fifty cents. The fees for combination membership and subscription may be sent either to the Secretary of the E. A. N. A. or to The American Esperantist Co.

As the Esperanto Herald has been discontinued, all official communications of general interest to the members will in future be communicated through the columns of Amerika Esperantisto, therefore every member of the E. A. N. A. should be a subscriber to this magazine which has done and is doing such efficient work for the progress of Esperanto in our land.

Within a few days after the issue of this number the annual meeting will be held and as per the By-Laws (Art. II Sect. 2) all payments thereafter made shall apply until Oct. 1 of the following year, it is strongly urged that new members especially do not wait for the beginning of the fiscal year before enrolling.

The Executive Committee is hoping much from the development of the Special Member feature and an early and cordial support of this movement will enable the officers of the Association to begin active work promptly with the beginning of the next fiscal year.

ARE YOU WITH US?

Invitations for the 1914 Congress have already been received from three important cities in Usono.

At the business meeting of the New England Esperanto Association, held at Marblehead, Mass., Saturday, June 28th, Mr. Wm. H. Huse, of

Manchester, N. H. was elected Councilor for the New England Division, to fill the place left vacant by the resignation of Dr. Fessenden. The Secretary hopes that the New England samideanoj will extend to the new Councilor the support and cooperation which were always so heartily and willingly rendered to him during his occupancy of the same office.

#### GEEDZIĜIS

F-ino Lena Abrahams kaj S-ro Benjamin W. Reich, (Nov-Jorko). F-ino Christine L. Soyard kaj S-ro Norman H. Hastings (Bostono).

PASSED PRELIMINARY EX- PASSED ADVANCED EXAMI-AMINATION NATION

(Atesto pri Lernado)

(Atesto pri Kapableco)

Albert R. Scanlon, St. Louis, Mo. Merle L. Dundon, Rootstown, O.

Oscar Baranda, St. Louis, Mo.

### Universala Esperanto-Asocio

Owing to unforeseen difficulties in the operation of the recently established North American Branch of the Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.), it has been decided to discontinue the said office, at least for the present. Delegates and isolated members of the U. E. A. in North America will, therefore, send their dues, reports, etc. directly to U. E. A. Central Office, Geneva, Switzerland, as before, or to the North American Director of the U. E. A., Mr. D. E. Parrish, at 4525 Moneta Ave., Los Angeles, Calif. If there is no Delegate of the U. E. A. in your city, write to Mr. Parrish, who will see that some one is appointed for the Office. All Delegates in North America must be members of the E. A. of N. A.

#### END OF OFFICIAL PART

#### BOOK REVIEWS

LA BRUNA LILIO, by Col. J. C. Cooper, 8 pages, 6 cents. An original Esperanto fairy story by an American samideano. The little book is daintily printed and artistic, although the absence of quite a few typographical errors would greatly improve it.

POEZIAĴOJ, by F. Schiller. Translated by Col. Zwach. 32 pages. 20 cents. Four translations from the works of the well known German poet Frederik Schiller. A nice addition to the library of poetry lovers, and the first number of a new Biblioteko-Esperanto.

AUTUNAJ FLOROJ, by Dr. Stanislav Schulhof, 29 pages. 20 cents. An attractive book containing ten original poems which are well-written and interesting. The green decorations on the pages are perhaps a little too dyspeptic looking compared to the fresh Esperanto color for which they are intended.

VOJAĜADO EN FINNLANDO. 20 cents. An interesting guidebook of this beautiful country, the natural beauties of which are known the world over. The large collection of well-reproduced photographs together with the Esperanto text, make the book especially desirable.

GVIDLIBRO TRA GRAZ. 15 cents. An illustrated guide book of this famous Austrian city. Contains pictures and information equally interesting to the traveler and the stay-at-home.

STUDO PER LUDO. 50 cents. A card game for Esperanto clubs and classes. In addition to furnishing an evening's amusement, it is claimed, an excellent method for students to learn the language. The pack contains one hundred cards.

#### ŜI VOLIS SCII

Kvar amikoj, revenante de teatro, eniris laŭmodan restoracion. La troprecizema maljuna fraŭlino, kiu estis la vespera gasto, estis ĉarmata de ĉio, ĉefe de la muziko. Dum la kelnero staris apud la tablo ŝi petis ke li eltrovu la titolon de la kompozicio kiun la orkestro ludis. La volonta kelnero promesis, sed aliaj devoj okupigis lin dum kelke da tempo, kaj kiam li revenis la fraŭlino tute estis forgesinta sian peton. Kiam li kliniĝis al ŝi kaj mallaŭte subparolis ion en ŝian orelon, ŝi eksaltis pro teruro. Tiam ŝi turnis sin kun sensenta, senkompata kolerego, al la malfeliĉa viro kiu atendis. "Kiel vi kuraĝas?" Ŝi ekkriis. La timigita kelnero malfacile klarigis kial li murmuretis tiel mallaŭte la titolon de la muzikaĵo: "Kion Mi Faru por ke Vi Amu Min?"

## AĈETANTE BOVINON

MI diras al mi, ke vi volas aĉeti bovinon," diris Gluko.

'Jes, mi ja pensas pri tio," respondis Kingvo, "Mia edzino estas leginta multon en la ĵurnaloj pri la sano, kaj ŝi venis al la konkludo, ke ĉiuj de la laktovendistoj faras konspiron por mortigi podeke la homidaron per la elmortigo de la infanoj. Ĉiufoje kiam nia infano ekkrias, ŝi opinias ke ĝia lasta trinkaĵo de lakto estas veneniginta ĝin, kaj tial ŝi pli kaj pli plendpetegas al mi, ke mi aĉetu bovinon. Mi do konjektas, ke mi tion devas fari, kvankam mi malŝatas—efektive, mi pli multe preferus, ke oni forsegu mian kruron ol ke mi devige milku bovi-

non. Mi tian agon ne faris de kiam mi estis knabo, kaj mi ne ŝatas tion

ekfari nuntempe."

"Ho, vi tion ne malŝatos, post kiam vi mallongtempe penos," respondis Gluko. "Bona bovino ja estas granda beno, kaj, bonŝance, mi nuntempe havas la plej bonan bovinon aĉeteblan en Usono. Kiam mi ekscii-ĝis ke vi serĉas tian beston, mi pensis ke mi iros al vi. Nia bovino estas la karulo de l' familio, kaj la ideo ke ni devas vendi ĝin, preskaŭ disrompas la koron de mia edzino. Tiu bovino estas tiel dolĉanima, ke homo povas sursalti ĝian dorson, kaj ien rajdi tute sen ia danĝero."

"Mi ne deziras selbovinon," respondis Kingvo. "Kiam mi deziros rajdamuzon, mi dungos ĉevalon. Se okaze mi aĉetos bovinon, ŝi devos

esti io eksterordinara rilate al la laktodemando."

"Nu! Mia bovino havas pardoneblan fierecon pri la kvanto kaj kvalito de sia lakto, kaj pri sia dolĉanimeco. Ŝi apartenas al la unua grado. Mi neniam vidis tian bovinon, kaj kiam ŝi min ekvidas alproksimiĝantan la domon, ŝi saltetas ĉirkaŭe la paŝtejo kiel hundideto."

"Mi ne opinias, ke mi bezonas tian bestaĉon. Ŝajnas al mi, ke tia bovino estos tedulo, faranta tian fiagon kiam ŝia posedanto hejmenvenas. Mi sentus kiel simio, se mi havus bovinon kiu agus tiamaniere. Pli ol tio, mi ne deziras havigi al mi bovinon por ke mi povu montri mian profundan amon al ŝi. Se mi havus bovinon kiu produktus grandan kvanton da lakto, mi ne ampripensus ŝiajn akiraĵojn, aŭ ŝiajn laŭdindajn ecojn. Mi ne ŝatas familiajn karulojn. En la pasinta printempo mi aĉetis ĉevalon, kiu estis familia karulo, kaj baldaŭ post kiam mi ĝin hejmenkondukis, ĝi havis kortuŝantan nostalgion, kaj distriate ĝi piedfrapis min tra la muro de la fojnejo."

"Estas nenia danĝero pri mia bovino ĝuanta tiajn sensencaĵojn. Ŝi estas bovino kiu havas unuarangan genealogion. Ŝia patrino—"

"Nu; ne komencu ion pri ŝia gentdeveno aŭ genealogio. Ŝia patrino eble povas troti unu mejlon en unu minuto—mi certe ne dubas pri tio,

sed, kiam mi serĉos por aĉeti bovinon tian, kian mi aĉetos, ŝi devos havi—
por sin rekomendi—siajn proprajn ecojn, kaj la familia historio de ŝia
praavoj ne utilos al mi pri mia decido. Mi forte malŝatas bestojn,
kiuj havas genealogion. Unufojon mi pagis grandan monsumon por
havigi al mi altrangan militeman hundon. Post nelonge, maljuna, malsanokula fipaŝthundo kuregis en la paŝtejon, kaj dismaĉis ĝian kapon.
Mi deziras aĉeti malnovan, malbonfaman bovinon, al kiu mankas unu
korno; bovinon kiu havas mallongigitan voston; iun kun unu perdita
okulo. Kiam mi estis knabo, mia patro havis tian bovinon, kaj ŝi estis
la plej bona bovino en Usono. Ŝi estis gentmiksita inter funelforma nubo,
kaj mirmekofago—laŭ mia kono—sed ŝi produktis pli multe da lakto
ol ia pumpilo, kaj jen bovino kian mi deziras aĉeti."

"Se vi bonvole akompanus min, kaj vidus mian bovinon, vi tuj tute

komprenus kiajn amindajn ecojn ŝi havas---"

"Inferon ŝia ecaro! Mi denove sciigas al vi, ke mi ne serĉas bovinon por plibeligi mian familian rondon. Kiam mi aĉetos bovinon, ŝi devige restos en la fojnejo, kaj neniam oni petos al ŝi, ke ŝi partoprenu en niaj sociaj funkcioj; tial, mi estas tute indiferenta pri la ecaro de l' bovino via. Ne, Gluko, mi vin tiom forte amas, ke mi ne volas kaŭzi la korpremon, senigante vin de via familia karulo. Se okaze mi aĉetus vian bovinon, neniam plu mi povus vin ree rigardi en la okulojn."

El "Chicago News" tradukis, John L. Stanyan.

#### EN LA OKCIDENTO

"Oni diras ke vi iris al Ruĝega Valo kaj linĉis senkulpan viron."
"Ne." Respondis Trifingra Sam. "Oni ne povas linĉi senkulpan viron en Ruĝega Valo. Ni nur linĉis Pajut Petĉjon antaŭ lia vico."

Du viroj veturis tra kamparo kie la tero estis treege senfrukta. Unu diris. "Mi opinius ke ju pli multe da tia tero oni posedus des pli malriĉa li estus."

Tuj la posedanto de la proksima kampo levigis sin de malantaŭ la ŝtonbarilo kaj diris. "Nu, mi ne estas tiel malriĉa kiel vi opinias. Ĉar mi posedas nur du akreojn."

Vartistino: Jen estas via nova frateto.

Tomĉjo: Mi s'pozas ke li ankaŭ venis per paketpoŝto.

Kial vi permesas ke via edzino faru kiel plaĉas al ŝi? Mi unufoje penis haltigi ŝin.

## LA NOKTO EN KIU MI INTERESIĜIS

IA edzino studis la lingvon internacian, uzis ĝin en korespondado, kaj ĝuis ĝian literaturon. Ofte ŝi alparolis min pri ĝi, dum mi ĉiam aŭ ne atentis aŭ nur miris ke tia afero povas iel interesi ŝin. Sed la Dio la edzinon forprenis; venis vespero kiam, por la unua fojo, la infano kaj mi estis solaj. Bone mi tenas en la memoro tiun aŭtunan vesperon, kiam mi ekdubis ĉu la vivado valoras la penon, ĉu la Dio estas bona. Tamen estis ĝuste tiam, post la sunsubiro de la tago en kiu mi entombigis la solan kreitaĵon kiun mi iam adoris, en tiu nokto bedaŭroplena, ke mi ekinteresiĝis en nia lingvo. Jen kio okazis:—

La ĉambro estis malluma, kaj mi sidis ĉe fenestro rigardante malsupren al la noktovolvita urbo. Tra kurtenita pordo de ĉambro apuda, kie brulis nokta lampo, venis de tempo al tempo ia demando de la filineto, kies endormiĝon mi atendis. Sed nek la voĉon infanan, nek la grandan

urbon sube mi atentis; mi estis profunde en medito.

"La edzino, la patrino de mia infano, inter la mortintoj," pensis mi; "nur lastan dimanĉon ni sidis ĉi tie kune, kaj nun, ho ve, ŝi estas por ĉiam for. Malfeliĉa filino mia, malfeliĉa mi . . . Sed por kio sopiroj? Pli bone estus forgesi ŝin. Ĉu iam mi povos? Estas rimedo, la drinkado helpus tiucele; kvietigi korodoloron ne estas krimo, certe. Kaj kial ne? Kial ne trovi forgeson en la nuna kaj estontaj solecaj vesperoj, per reveno al tiu gaja kluba rondo, al tiuj ŝercantaj, drinkantaj sed bravaj kamaradoj, kiujn en mia fraŭla epoko mi tiom bone konis, kaj ĉe kiuj mi estus tiom malavare bonvena nun? Ĉe ili ne ekzistas zorgo, bedaŭro, malĝojeco; mi ridetas eĉ pensante pri ili. Kia malstreĉo de sentoj rideto alportas! Ho, se nur mi povus ridi . . . . Kara edzino mortinta, pardonu min; malforta mi estas en ĉi tiu tempo de disiĝo de vi."

Mi leviĝis hontigita per la pensoj kiujn mia animo, ribelanta kontraŭ neŝanĝebla sorto, vekis. En la ĉambro kie la nokta lampo brulis nun jam longe regis silento. "Ŝi fine dormas," mi ekpensis; "nu, ĉu mi restos hejme, aŭ foriros por serĉi forgeson?"

Dum mi staris sendecide, "Vi estas tie ankoraŭ, Paĉjo?" venis tra la kurtenoj.

"Ho, la in— jes, mi estas ĉi tie. Kaj morgaŭ vespere vartistino estos sur mia loko," mi aldonis al mi mem, sulkigante la brovon.

"Mi konas la vorton kiun vi preskaŭ eldiris."

"Kia vorto?"

"Mi ne volas ĝin nomi."

"Vi dormu."

"Antaŭe vi devos ree kisi min."

"Mi deziras ke vi dormu, ne parolu plu." Kun tedita mieno mi denove sidiĝis, kaj turnis min al la mallumeco ekstere.

"Paĉjo," en kantanta tono.

"Silentu, nenian alian vorton."

"Kiam mi iros en la Ĉielon ĉu mi tuj trovos Panjon, aŭ ĉu mi devos demandi anĝelon pri ŝi?"

"Dormu, ĉu vi ne aŭdis min?"

"La irado Ĉielon ne estos malagrable se ni iros kune. Ĉu ni tiel iros, Paĉjo?"

"Sendube ni eniros duope, kiel la bestoj en la arkeon de Noa. Nun, silentu."

"Vi estas certa pri via irado?" Kun emfazo sur la antaŭlasta vorto.

"Ŝajnas ke mi diris dormu." Tre severe mi parolis, kun malkontento rigardante la kurtenitan pordon; tamen, tuj el ĝi flugis nova demando.

"Ĉu multe da mortintaj paĉjoj iras al-mi ne volas ĝin nomi?"

"Ne plu maltrankviligu Paĉjon; li volas pensi."

"Ĉu maltrankviligas vin pensi pri mortintaj paĉjoj?"

"Kial vi persistas paroli kiam---"

"Panjo ĉiam parolis aŭ legis al mi, dum mi endormiĝis. Panjo faris multe pri kio vi ne scias, sed mi instruos vin. Vi memoras, Paĉjo, ke vi estis ĉiam dum tuta la tago kaj ofte en la nokto for de la hejmo, tial vi nenion scias pri kiel agi kun mi. Ne estas dubo ĉe mi ke vi estis tre malproksima eĉ kiam mi naskiĝis; sed Panjo estis ĉi tie, mi ne dubas pri tio."

Tio estis tro multe. Mi ridetis. Forgesinte ĉion eksteran, mi deturnis min de la fenestro, kaj amuzita rigardis la litĉambran pordon. "Mi estas tro severa rilate la infanon," mi ekpensis; "kaj la estanta estas tempo kiam mi devus indulgi ŝin."

"Vi estu Panjo por mi, kaj mi estos Panjo por vi," daŭrigis la mola voĉo; "ĉion kion ŝi faris mi lernos kaj faros. Tiom mi devos lerni ke mi ne havos tempon plu iri al la lernejo."

Silento miaflanke.

"Mi ne havos tempon iri al ia lernejo." La aserto estis ripetita per voĉo iom demanda, iom duba, kun nuanco da subpremita espero.

Tiam mi ridis, dum interplektata kun la mia sonoris la rido arĝen sona de la infano, feliĉa ke ŝi donis feliĉon. Lumradio estis penetrinta la nubojn, mi ekeliris el la laberinto malespero. Por la unua fojo depost tiu fatala momento kiam la kuracisto, per mano levita super la edzino. silente sciigis pri la ĉeesto morta, paco eniris mian koron. Tiuj kiuj travivis similan sperton povas konstati kiom facile venas en tia tempo histeriaj ridoj. Neniam en klubo mi ridis pli kore. "Nu, por kio lasi tian bonan distraĵon por klubo?" mi petis min, ekbedaŭrante la multajn

vesperojn jam pasigitajn for de ĉi tiu aminda kreitaĵo, mia filineto.

"Kisu min, Paĉjo."

"Por kio kisi vin, kapriculino?"

"Por kio? Kia demando! Por ke mi sciiĝu ke mi estas amata de vi, kompreneble, ho la viro." En tono kaj vortoj mi rekonis la patrinon.

"Cu vi ne amas vian malgrandan knabinon? Mi-- mi farus ion por v--i." Duone sufokigata plorado sekvis.

Ke mi ne tuj alkuris al la infana lito por sekigi tiujn larmojn estis kaŭze de la fakto ke ĝuste tiam mi havis ion tiaspecan fari por mi mem Kiel la rido estis reakcio post doloro, tiel la larmoj postiris la histerian ridadon. "Mi venos baldaŭ kaj kisos vin, infano mia," mi diris, kun voĉo per emocio rompita.

"Vi ne foriros hodiaŭ nokte, lasante min sola?"

"Ne, ne, knabinjo."

La plorado ne ĉesis, anstataŭ tio ĝi subite pligrandiĝis ĝis torente fluis la larmoj. Mi estis mirigata. "Pro kio vi ploras nuntempe, kara?"

"Ĉar nun estas tiam kiam plori estas agrable. Mi sentas ke vi efektive amas min, Paĉjo, kaj antaŭe mi ektimis ke alie estas. Jen kial plaĉas al mi fari larmojn. Depost Panjo mortis ŝajnis kvazaŭ neniu iam ree komprenos min. Venu, Paĉjo."

"Mi serĉas ian libron en kiu legi al vi, kiel farus Panjo," mi diris mensoge—— la vero estas ke mi hontis aperi kun larmoplenaj okuloj antaŭ tiu malgranda virino.

"Alportu la verdan libron kuŝantan sur la skribtablo, kaj legu al mi pri la virineto de la maro," ŝi ordonis gaje, la larmoj jam forgesitaj.

"Jes, mi venos tuj kaj kisos vin kaj legos en la verda libro pri lakiel vi nomas tion—virineto de la maro? Mi promesas. Gajan vesperon ni havos, nur iom atendu." La verdan libron mi trovis, kaj portis ĝin en la lumon striantan el la litĉambra pordo. "Kia kabala titolo: k-r-e-s-t-o-m-a-t-i-o. Sankta Mikaelo!" Mi, tiu kiu antaŭe eĉ ne ekrigardis ĝian tekston, sengarde estis promesinta legi libron en Esperanto.

Estas viroj kiuj, sin trovantaj en mia tiama situacio, kun rideto forĵetus la libron kaj ne plu pensus pri la promeso al la infano. Sed por mi nenia promeso estas triviala. Por mi la vortoj de promeso estis kvazaŭ sanktaj, depost miaj knabaj jaroj kiam la patro zorge instruis al mi ke ĉiu promeso estas registrita en Ĉielo, tuj post kiam ĝi estas donita. Kutime, mi tre malofte faras promeson, sed dank' al la patra instruo dum tuta la vivo ĉion kion mi unufoje estas promesinta fari mi faris. La vivlonga kutimo estas forta, jen kial mi ne hezitis provi la ŝajne neeblan. Kial kun la penso: "Mi faru ĉion por ne rompi mian promeson al la infano," mi kuraĝe malfermis tiun libron kun la ĵargona nomo.

Fulme kuris la pensoj jene: "Kie estas la indekso? Malantaŭe de

ĉio. Stranga loko por indekso. F-a-b-e-l-o-j k-a-j L-e-g-e-n-d-o-j; ĉiu parolanto de la angla povas diveni la signifon de tiuj vortoj. Tiu 'j' estas sendube multenombra finiĝo. Ridinde, kiu povas elparoli 'j' post 'o?' V-i-r-i-n-e-t-o d-e l-a m-a-r-o, hmm, Esperanto similas la francan, oni diras; nu, se tiu 'maro' estas la franca mer, mi povas diveni la reston. Do jam estas trovita la rakonton kiun la infano volas aŭdi. Kaj jen sur la skribtablo: The American Esperanto Book, kaj A Complete Grammar of Esperanto, nun mi nepre tuj povos legi."

"Venu, Paĉjo."

"Jes, unu minuton pli." Mi komencis la tradukadon. "M-a-l-p-r-o-k-s-i-m-e. Kion signifas tio? 'Mal' estas france 'malsano,' se mia memoro ne trompas min; 'proksime' povas esti la franca kaj ankaŭ angla proximite. Tial 'malproksime' klare estas kunmetita vorto signifanta preskaŭ malsana. Sen dubo la tuta frazo diras ke la virineto de la maro estis preskaŭ malsana kaŭze de la ŝaŭmantaj ondoj—marmalsano kompreneble. Vere la lingvo estas mirinde facile akirebla, kiel mi jam aŭdis; bonŝanco tio estas, ĉar restas nur duono da minuto en kiu lerni ĝin. Nu, kiel interpreti la duan paragrafon?" Ankoraŭ starante mi enprofundiĝis en mia tasko ĝis kiam, post kelke da minutoj, mallaŭta, regula spirado atentigis min ke la knabineto dormas. "Bone, pli da tempo por preparado." Sensone mi ekbruligis lampon sur la edzina skribtablo, kaj provizita de diversaj verkoj koncerne la lingvon eksidis por energie labori ĉe ili.

Nu, kvankam mi baldaŭ rimarkis ke la precizan sencon de tiuj unuaj linioj mi ne ankoraŭ kaptis, mi neniom malesperis; mi iom enrigardis la lernolibrojn, kaj baldaŭ la afero tre bone prosperis ĉe mi. Kiam la noktomezo alvenis mi efektive povis traduki senerare tutan paĝon de tiu andersona fabelo.

Nova tago estis. Tre kontenta pri mi mem, mi fermis la lernolibrojn kaj Krestomation de mia perdita karulino, estingis la lampon kaj turnis min por serĉi ripozon. En tiu momento, de ie ekstere en la dormanta urbo, aŭdiĝis viraj voĉoj en kantado raŭka, malkonkorda, profana. Estas nur unu kialo por tia bruo je tia horo. Malestime mi ridetis.

"Ebriaj vagantoj en malluma nokto riskas rompi al si la malsaĝajn kapojn, sed tion ili plene meritas, se ili konsideras sian agadon plezuro," estis mia penso. Kaj paŝante en la ĉambron kie la nokta lampo brulis, kaj kien la mizera kantado ne povis entrudi, mi rigardis longe al mia sonĝanta filineto, mia perdita karulino retrovita. "Kiom ŝi povas rememorigi min pri tiu kies ĉiu rememoro estas dolĉa," mi pensis. "Certe, mi de nun restos kun la infano en la vesperoj. Kaj kiam en ŝia kunesto kio pli bona ol distri min per la studo kiun ŝia patrino trovis tiom agrabla. Ĉu ĉio kio tiun interesis ne estas nun por mi kara?"

Por sigeli la decidon, klinante, mi nigran buklon kisis; kaj poste, kun brakoj levitaj super tiu liteto, mi ĵure murmuris: "De ĉi tiu nokto mi nenion deziros ĉe klubo aŭ ia drinkejo. Ilin englutu la—mi ne volas ĝin nomi."

M. JAMES.

#### POR ROZO

Margerito kaj parolis dum kelkaj horoj pri la vetero, kaj tiel plu. Iun fojon, marŝante al ŝia domo li preterpasis viron kiu portis rozon en sia butontruo. "Bonan ideon," pensis Johano, "Mi ankaŭ portos rozon." Li eniris en la butikon de florvendisto, aĉetis rozon, kaj enmetis ĝin en sian butontruon.

Alveninte al la domo de Margerito, li sidiĝis kaj parolis dum longa tempo pri aferoj kiuj ne interesas nin. Fine ŝi diris, "Vi portas tre belan rozon, Johano." "Jes," respondis li, "Mi opinias ke ĝi estas bela," "Ĉu vi permesos ke mi flaru ĝin," ŝi demandis. "Jes, mi permesos," respondis li.

Si transpasis al lia seĝo kaj klininte sian kapon, ŝi longe flaris la rozon, kiu sin trovis en lia butontruo. Ŝiaj frizaj haroj tuŝetis lian vizaĝon kaj ŝia vango sin trovis tre proksime al liaj lipoj, sed li ne eĉ movigis siajn okulharojn. Li estis kompreneble tre modesta viro.

Fine ŝi diris, "Joĉjo, mi donos al vi kison por tiu ĉi rozo." Li akceptis la proponon kaj post kelkaj minutoj ŝi portis la rozon kaj li portis rideton. Subite li ekstariĝis, prenis sian ĉapelon kaj kuris al la pordo. "Ne iru hejmon, Joĉjo," ŝi diris, "estas ja frue." "Mi ne hejmon iros," respondis li, "mi revenos baldaŭ. Mi nur iros al la butiko de la florvendisto por aĉeti alian rozon." Jos. H. Noble.

#### KATIDO KAJ MI

En la agrabla somera vetero,
Sub la hela blua ĉielo,
Gaje ni ludas—
Katido kaj mi.
En la vintro malvarma, malgaja,
Sur la varma tapiŝo—ni kuŝas,
Ne estas malgaja,
—Katido kaj mi.

Tradukis, MARION NEWTON, Dekjarulineto.

#### **FABELO**

AM ŝipo estis detruita sur marbordo de fruktoporta sed senhoma insulo, kaj ĉiuj veturantoj konsistante el viroj, virinoj kaj geinfanoj, sukcese atingis la bordon, kun sufice da provizoj; kaj, perdinte la esperon de eliro, ili formis regadon por sedauĝereco de persono kaj apartenajo, kaj la fondo de juĝagado por ĉiuj. Nemalhelpate de antaŭa decido, almenaŭ sur la insulo, ili estis senkonscie influataj de frua edukado-antaŭaj kutimoj de pensado. Kiam oni pripensis la voĉrajtan aferon kelkaj el la virinoj petas voĉdonon egalan al tiu de la viroj en la elektado de oficistoj. La viroj rezonis ke kiel la virinoj ne estas sufiĉe fortaj por anigi la armeon ili ne devas demandi vocdonon. La respondo ke duono de la viroj estis neelekteblaj je milita servado ne konvinkis la virojn kiuj decidis la aferon. Viroj kiuj pasigis la vesperojn ĉe la loĝio, klubo aŭ pli dubindaj lokoj, solene diris al siaj edzinoj ke ili devas resti ĉe hejmo, kaj malgaje bedaŭris la ruinigajn efektojn sur la hejmo de la longa foresto de virino dum ŝi voĉdonis. Oni faris multe el la fakto ke plimulto de la virinoj, sub la influo de antaŭa kulturo (tia estas la povo de frua edukado) ne deziras la voĉrajton, kaj iuj el ili eĉ kontraŭstaras ĝin.

La bonkoraj viroj argumentis ke oni ne povas haltigi iujn societajn aŭ politikajn malbonecojn per plilarĝigado de la voĉrajto; ke ĉiuj politikaj temoj estas pli sendanĝeraj en la manoj de la viroj; kaj almontris fiere al la ĵaluza zorgo per kiu ĉiu viro deziris konservi la purecon de la baloto; kaj obteni ne tiom la triumfon de partieto kiom la sukceson de la volo de la popolo.

Oni ne plilarĝigis la vocrajton kaj la viroj komencis regi. Je la tago de la elektado la poŝoj de la politikistoj elŝvelis per mono obtenita de kandidatoj kaj korporacioj. Oni elpagis ĉi tiun (iom da ĝi) al la viroj kiuj atendis por voĉdoni por la plejproponanto. Multaj el ĉi tiuj, ne obtenante pli altan prezon, vendis siajn voĉojn por trinko da biero.

Ĉe la politikaj kunvenoj oni uzis ĉiun rimedon por obteni la venkon, ne por la popolo, aŭ eĉ por la plimulto, sed por la kliko kiu povis sukcese regi la politikan maŝinaron. La rezulto estis la regado de specialaj klasoj, la malbonigado de publikaj oficistoj, kaj subaĉetado de ĉiuj administrantaj publikan laboradon, dum la publiko pagis la kalkulojn.

Estis du partioj en la respubliko, tiuj kiuj estis en administrado, kaj tiuj kiuj deziris tien eniri, kaj ambaŭ partioj fiere almontris al la bonfaraj rezultoj de vira voĉrajto; dum unu el la ekleziuloj publike donis dankojn ke la politiko estas tiel pura kaj malembarasata de putriĝo, kaj ke la volo de la popolo estas triumfa; kaj ĉiuj (viroj) diris, "Amen."

WM. H. HUSE.

#### VERSAJNE

Maltrankvila Demandanto: Kial via gorĝo esta bandaĝata, mia kunulo?

Malafabla Malsanulo: Dolora gorĝo.

M. D.: Kiel vi faris tion?

M. M.: Mi supozas ke estas tial ke mi trinkis el malseketa glaso.

-London Opinion.

#### STATEMENT OF OWNERSHIP, ETC.

Of Amerika Esperantisto, published monthly at West Newton, Mass., required by the Act of August 24, 1912.

Editor, Ernest F. Dow, West Newton, Mass. Managing Editor, same.

Business Manager, same.

Publisher, The American Esperantist Co., Inc., West Newton, Mass

Owners: (If a corporation, give names and addresses of stockholders holding 1 per cent or more of total amount of stock).

Boston Esperanto Society, Boston, Mass, Flora M. Wyman, No. Abington, Mass, John M. Clifford, Jr., Braddock, Pa. Ernest F. Dow, West Newton, Mass, Wm. Ł Church, Boston, Mass, H. S. Hall, Cleveland, Ohio. H. B. Besemer, Ithaca, N. Y.

Known bondholders, mortgages, and other security holders, holding 1 per cent or more of total amount of bonds, mortgages, or other securities:

None.

(Signed), ERNEST F. Dow,

Business Manager.

MASSACHUSETTS, SS.

Sworn to and subscribed before me this 27th day of June, 1913.

[SEAL]

WALLACE TRAVIS.
Notary Public.

My commission expires June 26th, 1919.

## Keep Cool all Summer for \$2.25

Every one of these books guaranteed to send cold chills all over you on the hottest day in August. . . . .

They all deal with cooling themes. Better than electric fans and mint juleps. You can see the frost on 'em. B-r-r-r.

En Rusujo per Esperanto, I 29 pages,	\$ .45
Sub la Meznokta Suno, 121 pages,	.35
Sub la Neĝo, 144 pages,	.35
La Virineto de la Maro, 42 pages,	.45
Pola Antologio, 154 pages,	.58
Tradukoj Tri, 55 pages,	.25
La Fundo de la Mizero, 91 pages,	.25

Order separately at list prices—or—not because we need the money, but from a purely philanthropic desire to see you comfortable—we will send you the whole outfit for \$2.25 postpaid.

This offer good during July and August only.

### THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

West Newton, Mass.

#### DID YOU GET YOURS?

## Millidge Esperanto-English Dictionary

An invaluable book (496 pages) printed on strong thin paper with wide margins, and durably bound.

You Can't Keep House Without It.

PRICE \$2.00

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

WEST NEWTON, MASS.

## When you need

Printing
Engraving
Die Stamping
Book Binding
Typewriter Ribbons
Carbon Papers

consult us

We can give you good service, good work and Reasonable Prices.

The American Esperantist Co., Inc. WEST NEWTON, MASS.

## SPECIAL COMBINATION OFFERS

#### TO NEW SUBSCRIBERS ONLY

For a limited time we are able to offer the following combination prices:

One year subscription to Amerika Esperantisto, and	\$1.00	\$1.50
American Esperanto Book (cloth),	\$1.00	41.00
One year subscription to Amerika Esperantisto, and	\$1.00	\$2.00
Complete Grammar of Esperanto (Kellerman),	\$1.25	
One year subscription to Amerika Esperantisto, and	\$1.00	\$2.50
Esperanto-English Dictionary (Millidge), cloth,	\$2.00	
THE AMERICAN ESPERANTIST	COI	nc

West Newton, Mass.

BOOKS BY EDMOND PRIV	AT		
KARLO (A New Edition, our own) .			\$.15
Tra l'Silento			
(Parchment binding with red and gold le	etteri	ng)	.40
(Limp chamois with gold lettering).			.60
HISTORIO DE ESPERANTO .			.20
ESPERANTO IN FIFTY LESSONS (Cloth)			.50
Pri Esperanta Literaturo			.20
The American Esperantist Co. West Newton, Mass.	, Inc		

## LA REVUO The best literary magazine entirely in Esperanto :: ::

The only magazine which has the constant collaboration of DR. L. L. ZAMENHOF, the author of Esperanto

Yearly Subscription \$1.40 Single Copy, postpaid, 15 cents

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

AGENTS FOR U. S. A.

N. B.—The American Esperantist Company has on hand a quantity of back numbers, equally as good as current numbers from a literary point of view. These we will dispose of, as long as they last, at ten cents a copy, twelve copies for \$1.00. We can not guarantee to send any special numbers at this rate.

#### Legu tiun ĉi Esperantan Libron TRADUKOJ TRI

Enhavas tri beletajn ĉarmajn rakontojn de Kanado, tradukitajn de konata Kanada Esperantistino Sino. L. deL. Helliwell.

La rakontoj estas

Je la Nomo de la Reĝino Serĉado por Fantoma Knabino Idilio de Kebeko

55 paĝoj. Bone presita kaj bindita (papere) 25 cendoj afrankite, ĉe

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc. WEST NEWTON, MASS., USONO

Esperanto-ŝlosilo

Usona Eldono

## **ESPERANTO KEY**

You will want a number of these at once. Start in by writing a note in Esperanto to three or four non-Esperanto friends, either out-of-town people or in your own city,

and enclose a copy of the Key.

The new edition contains more description of "the why and wherefore" of Esperanto, and is therefore a still more valuable propagandilo. You can not get along without these. Let them do some of your talking,—it saves breath!

25 Keys in the English language for only 25 cents. 100 for only One Dollar. (But two cents apiece if you buy only one at a

time.)

#### THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

West Newton, Mass.

#### ESPERANTO STATIONERY

Fine quality paper with engraved green star and word "Esperanto."

One quire, with envelopes to match, 65c. Sample sheet and envelope, 4c.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc. West Newton, Mass.

Rakonto kaj Aventuro

Contains two excellent short stories in good original Esperanto. A neat little book of 31 pages, just the right size for your pocket. Read it on the car or in the train. It costs only fifteen cents,

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

## Foreign Magazines

Twelve copies, our selection, back numbers, for only sixty cents

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

West Newton, Mass.

#### POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto, aperadas okan jaron, čiam pliinteresigante sian programon.

En 1613-a jaro "P. E." krom 12 ilustrataj, zorge redaktataj numeroj en klasika, pure fundamenta Esperanto, donos al siaj abonantoj senpagan:

#### "Literaturan Idonon"

(200 paĝa vol mo)

"Pola Esper." enhavas konstantajn rubrikojn: Propagandaj artikoloj. "Esperantaj demandoj. "Rakontoj, noveloj, poezioj. "Populare scienaj artk. "Scieco kaj Vivo. "Opinioj. "Kondsideru! "Kroniko. "Korespondaĵoj. "El Esper. Mondo. "Faktoj. "Bibliografio. "Revuo de la gazetoj. "Konkursoj kaj problemoj. "Humoraĵoj. "Respondoj de la Redakcio. "Muziknotoj. "Ilustraĵoj. "Anoncoj.

Sendu abonpagon (\$1.40) al la American Esperantist Company, West Newton, Mass.

#### LA KOLOMBA PREMIO

A humorous sketch translated from the French of the great Dumas.

A nicely printed 48-page book, handy to carry around with you, and most enjoyable reading. Only 20 cents.

The American Esperantist Co., Inc. West Newton, Mass.

#### LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO (fondita en la jaro 1909).

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj "Princo Serebrjanij", kies prezo por ne-abonintoj
estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉio abonanto de
la j. 1913,—krom 12 n-roj de l'gazeto—senpage ricevos donace post kelkaj monatoj
belan Esperantan libron:

#### "ORIENTA ALMANAKO"

el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p. k. t. p.

"La Ondo" aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16-24 pag.

Formato 17x26. Bela kovrilo.
Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.)

Sendu abontagon (\$1.10) alla American Esperantist Co., West Newton, Mass.

# You Ought to Take SCIENCA GAZETO

A monthly magazine entirely in Espenanto, devoted to Science and Industry Contains semi-technical articles on many interesting subjects. Subscribe for your own pleasure—and show each copy to some scientific friend.

Send Subscription (\$1.50) through The American Esperantist Co., Inc. West Newton, Mass.

(Sample copy, 20 cents)

Begin your letter-"Having seen your ad in AMERIKA ESPERANTISTO-"

Helpu Esperanton en la Oriento!

### JAPAN TRADE REVIEW

Monata Ilustrita Revuo kun ESPERANTA FAKO

Jare: Sm. 2.00; Unu Kajero Sm. 0.20 Adreso: 4 Yurakucho-Itchome Tokio, Japanujo



#### THE AMERICAN THEOSOPHIST

A magazine dealing with Theosophy and Occultism, Universal Peace and the Wider Tolerance

Official Organ of The American Section of The Theosophical Society

Mrs. Annie Besant President

Albert P. Warrington Gen Secretary and Editor

\$1.50 a year Single Copy 15 cents Foreign \$2.00 Address: Krotona, Hollywood, Los Angeles, Cal.

## Short-Story Writin

A course of forty lessons in the history, form, structure, and writing of the short-story taught by J. Berg

> Esenwein, Editor of Lippincott's Magazine.



Story-writers must be made as well as born; they must master the details of construction if they would turn their talents to account.

May we send you the names of students and graduates who have succeeded? And the success their letters prove is practical. It means

Dr. Esenwein recognition, accepted manuscripts and checks from editors.

One student writes: "I know that you will be pleased when I tell you that I have just received a check for \$125 from Everybody's for a humorous story. They ask for more. I am feeling very happy, and very grateful to Dr. Esenwein.

We also offer courses in Photoplay Writing, Versification and Poetics, Journalism; in all over One Hundred Home Study Courses, many of them under professors in Harvard, Brown, Cornell, and leading colleges.

250-Page Catalogue Free.

Please address.

#### THE HOME CORRESPONDENCE SCHOOL

Dept. 542

Springfield, Mass.

#### UNUAGRADAJ **ESPERANTAJ** DISKOJ

por via

**FONOGRAFO** 

La Espero, Al Vi, Preĝo sub la Verda Standardo, k. t. p.

Mendu ĉe

S-ro C. J. CLEMENTS UTOPIA, FLORIDA, USONO

#### DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu linio. Kvarfoja anonco kostas 50c. (1 Sm.) por ĉiu linio Linio enhavas proksimume 45 literojn punktojn aŭ spacojn ]

S-ro J. Teply, semb. ul. 124, vys, Myto, Bohemia-Austria.

S-ro J. A. Proenca, rua do Rosario 215, Porto, Portugal. PK., prefere pri kostumoj (PM bildflanke).

S-ro Raymond Burns, Coquille, Ore.. U. S. A.

Don't forget the October

### BERN CONGRESS-PROPAGANDA NUM-BER OF AMERIKA ESPERANTISTO

10 copies for 50 cents. ORDER NOW.

#### Specialisto pri la okuloj kaj la spina nervo

Okulvitroj prave almezuritaj al la okuloj.

D-RO ANTONIO ROMITO

410 Liberty Ave., Room 602, - PITTSBURG, PA.

### RIDEGU KAJ GRASIĜU

Legu "La Mopso de Lia Onklo"

Tre sprita kaj bonega rakonto kiu ridigos vin treege,

The American Esperantist Co., Inc.

West Newton, Mass.



#### LA "UNUA LECIONO"

Vivas hodiaŭ multaj avinoj, kiuj antaŭ sesdek jaroj ricevis sian 'unuan lecionon' ĉe

#### Emerson' Piano

Kaj tiun pianon ili ankoraŭ plej amas.

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj. Petu katalogon.

EMERSON PIANO CO., Boston, Mass.